# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 06/06/2024 sescentnaŭdeka eldono (unua eldono 26/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**Esperanta Retradio** Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŬskultadon kaj legadon Ĉiun tagon Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

**PLIALTIĜO DE VIVODAŬRO ĜIS 2050** 25A DE MAJO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## Parolas ŝafino al sia ido.

Jen la fino de la terura eraĵo!

Kaj troviĝas, bedaŭrinde, ankaŭ homoj, kiuj malamas labori. Ili anstataŭ labori, devigas aliajn homojn labori, eĉ laboregi kaj transdoni la plej grandan parton de sia salajro al la tiel nomata registaro, kiu elspezas la monon aĉetante la kadavrojn de ĵusnaskitaj ŝafidoj kaj aliaj senkulpaj bestidoj. Sed ne nur tio. Ili ankaŭ mortigas unu la aliajn. Ne estas sciate, ĉu ili manĝaĉas unu la aliajn, espereble ankoraŭ ne, sed ne surprizas nin, se tre baldaŭ ili faros ankaŭ tion.

Ili eĉ malamas unu la aliajn, kaj mensogas unu al la aliaj. Kredu min filino, ili estas la plej kruelaj el ĉiuj kreitaĵoj de Dio. Dio diris: “ne mortigu”! Homoj mortigas. Ili kun grandega ĝojo mortigas ĉiujn el ni, la sendefendaj bestoj. Kaj kun eĉ multe pli granda ĝojo ili mortigas ankaŭ unu la aliajn! Neniam kredu ke homoj estas amikemaj. Verŝajne kelkaj el ili estas, sed bedaŭrinde troviĝas iu grupo da homoj, kiuj neniam laboras, ili sidas kaj fumas fiodorantajn cigarojn kaj drinkaĉas alkoholon la tutan tagon. Ili servas la Diablon kaj devigas aliajn homojn, multe pli bonajn ol ili mem, eliri kaj mortigi ĉiujn, kiuj parolas aliajn lingvojn ol ili mem.

Neniam kredu tiujn fihomaĉojn, ili ne amas iun ajn, ili amas nur sin mem!

P.S. Mi esperas ke vi ĝuis la legadon kara Roger. Mi jam antaŭĝojas baldaŭ relegi ĝin.



Viaj du bonaj amikoj, Zammyhof kaj Bob

Amike *Bob Felby*

# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 30-a de majo 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Caroline Turner

## (1) Somerkursaro 2025

Fina decido:
La 2025-a somerkursaro ja okazos ĉe St. Ann's Kolegio en Adelajdo Dim, 5-a de jan – sab, 11-a de jan 2025
Jen la aliĝkostoj por partoprenantoj
$ 150.00 – se vi pagas ĝis la 31-a de aŭgusto 2024
$ 200.00 – se vi pagas ĝis la 15-a de novembro 2024
$ 250.00 – post la 15-a de novembro 2024
Limdato por aliĝi: 15-a de decembro 2024
- (a) Baza ĉambro (komuna necesejo kaj banĉambro) $80.00/nokte
- (b) Ĉambro (kun necesejo kaj banĉambro) $100.00/nokte
- (c) Duobla lita ĉambro $ 120.00/nokte/por la ĉambro ($60.00 po persono, se estas du)
- Matenmanĝo $17.00 - Tagmanĝo $15.00 - Vespermanĝo $22.00 - Bankedo $25.00
- Parkejo $25.00/24horoj

Entute ...se vi partoprenas la tutan eventon (6 noktoj; 6 matenmanĝoj, 5 tagmanĝoj, 6 vespermanĝoj)
(a) $480 + $312 = $ 792 (b) $600 + $312 = $ 912 (c) $720 + $312 = $1,032
Do, ne hezitu kaj aliĝu sur la retejo de AEA

**Instruistoj?** Trevor Steele
Adam Levy el Sidnejo ne povas ..... Sandor kontaktos aliajn eblajn instruistojn

## (2) Rilato kun Nov-zelando

Ni diskutis nian rilaton kun AENZ
Ĉu ni daŭrigu la komunajn kongresojn? Kiel?
Konfuza situacio ..... ni kunlaboru!

## (4) Esperanto Domo en Melburno

Du konkretaj proponoj: Oficejo en South Melbourne aŭ apartamento en la urbo centro apud Flinders Street.

Ankaŭ la premo forpreni la aĵojn de *Ross House* kreskas.

La diskutoj daŭras.

Se VI havas proponon, .... Ne hezitu kaj kontaktu nin.

## Venonta estrarkunveno



Ĵaŭdon, la 13-an de junio 2024 je la 17:00 (16:30 en SA) *Sandor Horvath*

Karaj,
Ĉu vi ŝatas spekti realec-televidajn konkursojn? Nu, vi nun povas spekti tian konkurson en Esperanto en kiu junuloj vojaĝas kaj solvas defiojn. Jen la unua epizodo.



https://www.youtube.com/watch?v=J-_H9WFpnlI *Nicole Else*

Amike, Nicole




Karaj,
Eŭropaj elektoj. Jen reklamfilmeto por instigi personojn voĉdoni por la partio Europe Démocratie Esperanto. La filmeto estas en la franca lingvo, sed vi povas enŝalti subtekstojn en Esperanto.
https://www.youtube.com/watch?v=IR43AX1qfXA
Amike, *Nicole Else*

## El Brizbano



Pasintan dimanĉon la membroj de BES havis sian monatan kunvenon ĉe la Brizbana Biblioteko kaj ili studis novan lecionon ( vidu bildo: Linda, Vere, Ethan kaj ses aliaj)
*Peter Danzer*



**3ZZZ** En la elsendo de la 3a de junio vi trovos anoncon pri alia grava evento kiu okazos en Afriko : la kongreso de la Internacia astronomia unio , raporton pri la pozitiva efiko de manlaboro kaj kontakto kun la tero . Estas informoj ankaŭ pri la vespo, kiu endanĝerigas la abelojn kaj pri aproj. Franciska

